# KOMITATO de 16-a de junio 2026

[ĉeestas: S = surloke, R = rete pere de Zoom, T = telefone pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ELEKTO * | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Dominique | COUTURIER | DC | Repr. de la membraro | 2026 | | | X | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | 25/26 | | X | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | 22/24/26 | R | | | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | 23/25 | R | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | 23/25 | | X | | |
| Viktoro | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | 2025 | S | | | |
| Gilles | TABARD | GT | Repr. de la membraro | 2026 | R | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | 2025 | R | | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | | R | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | | | X | | VS |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | | X | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | | | X | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | | R | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | | |
| Benoît | ENTE | BE | Repr. de FKEA | | R | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | | R | | | |
| Briac | MILLON | BM | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | | | | X | |

14 ĉeestis el 21, 5 senkulpiĝis, 2 forestas, 1 donis povon -> 15 voĉoj.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min
XG prezidas, VS protokolas, MP helpas

0.3 **Definitivigo de la tagordo, eventualaj aldonoj** 5 min
Aldonu la proponon de Larysa Osadchuk pri la kongreso pri Esperanto kaj Origanio (traktita je la komenco de la kunveno kun ĉeesto de Larysa kaj Karlo (*Carlos*) Oliveira (el Brazilo)

0.4 **Dato de la venonta kunsido** 4 min

A) surloka kunveno : 17a de oktobro : laborkunsido
18a de oktobro de la 10-12 kaj 14-16 surloke aŭ rete.
Benoît Ente ne estos libera la 18a matene. 4 min

B) reta kunveno : inter 3-a kaj 9-a de Septembro tagmeze, posttagmeze aŭ vespere, KK konsultota per framadate (MLM proponas https://www.when2meet.com/ por ke ĉiu montru siajn disponeblecojn).

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1 Informo pri la estraro — DISKUTO 10 min

Ni ne ŝanĝis la postenojn. Tamen pli da personoj en estraro kunlaboru kun RF pri librotenado, rememorigoj. SM proponis iom da trejnado kaj PQL plu helpos. Ni strebos plifortigi la kasistan laboron. Daŭre kriza situacio ĉar ne estas vickasisto kaj RF baldaŭ atingos 4 jarojn en kasista posteno. Tio ne estas komplika sed peza laboro. Ĉiuj agoj de la asocio pezas sur kontotenado kaj tio kreas multajn spezojn pritraktindajn. Ni bezonas serĉi spertojn kaj esperas kompetentulojn ekzemple el lokaj asocioj.

### 1.2 Nova aliĝilo 2026-2027 — DISKUTO 10 min

XG skribos al ĉiuj kluboj pri eventuala kotizŝanĝo (lokaj respondeculoj povas mem ĝisdatigi en Arthur). Sen ŝanĝo la ĉi jaraj kotizoj estas aŭtomate reproduktitaj. Ni celas presi dum la somero por disponigo al la lokaj asocioj en septembro.

### 1.3 Strategio kaj laborplano de la nova komitato — DISKUTO 15 min

Ne sufiĉis tempo por trakti la temon.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : flugfolio presota, — DISKUTO 10 min

10 000 ekzempleroj estos presitaj. Flugfolio vendita je la presikosto (8 centimoj antaŭe, prezo kontrolenda laŭ la aktuala kosto). XG proponas ke ĉiu klubo interesata ricevu senpage 50 ekzemplerojn por konigi la ilon. (Ni adaptos pli precize la kvanton laŭ sendokostoj por pli efika elspezo.)

### 2.2 Preparado de la kalendareto 2027 — DISKUTO 10 min

Por pretigo antaŭ septembro. Temoj ekzemple: balota jaro (preferinde ne laŭ pluraj kiuj opinias ke oni ne kreu konfuzon kun la seriozeco de la baloto), jaro de daŭripova turismo, 140a datreveno de Eo, Eŭropa kongreso en Provenco.

### 2.3 Trejnad-sesioj — INFORMO 5 min

- Pierre Dieumegard (merkrede la 8an je la 19a kaj sabate la 11an je la 9a de julio) pri sperto de Eo 45 pri agado en lernejoj kaj edukadministeria agnosko. Inviti ĉiujn klubojn kaj membrojn.
- Masimo Ripari (sept-dec) pri konvena verkado de ĵurnalaj artikoloj (dum 4 unuhoraj sesioj). Inviti internacie.
- Dennis Keefe (okt) pri allogo de lernantoj al Esperanto.

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

### 3.1 *Le Monde de l'Espéranto* — DISKUTO 5 min

Plu prilaborata. Ni celas presigi ĝin dum somero. Se iuj volas partopreni relegadon, tiuj bonvenas.

### 3.2 Esperanto Aktiv — INFORMO 5 min

Estonta numero kun intervujo de Thomas Creusot fine de Junio. Sendi kontribuojn antaŭ la 24-a de Junio. Posta numero fine de Aŭgusto aŭ de Septembro.

### 3.3 Kongresoj 2027, 2028 kaj 2029 — DISKUTO 10 min

*Bilanco de la 2026-a kongreso* :

Fotoj estas ankoraŭ bonvenaj, XG kreis albumon ĉe
https://photos.app.goo.gl/tM326KhChdVPL1BW7 (kaŝi adreson en publikigota protokolo)
Financa bilanco estos pozitiva, ĉirkaŭ 3000 eŭroj da profito.
Postkongreso okazos la 7an de oktobro kun la lokaj partneroj (urbodomo, asocioj, ktp).
Por venontaj kongresoj, inviti BR kaj BV por subteni per sperto postajn LKK-ojn. Kunveno inter kasisto de UFE kaj de LKK estu antaŭvidita por kontroli kiu faras kion kaj la bezonojn de ambaŭ flankoj.
Rimarko pri manko de papera programo.
Manko de profito de la trinkejo pro manko de libera tempo inter programeroj.

*Eŭropa kongreso 2027 en Carry-le-Rouet apud Marseille*.
Ne estos trinkejo proponita. Eventuale proponi vendojn de T-ĉemizojn (kun logotipo de la kongreso) en la libroservo, mendi ekz. 200. MBM proponas ke la partoprenantoj pagu por T-ĉemizojn se ili deziras kiam ili aliĝas. (Aldoni linion en la aliĝilon por tion mendi.)

RC : sendos informojn al TS pri la nomoj, kontaktoj, telefonnumeroj de lokaj federacioj kaj apudaj landoj. XG donos alireblecon al la kontaktoj registritaj en nia datumbazo Arthur. (Kiel kutime por organizantoj de kongreso)
Aliĝilo pretos je la venonta KK. Eblos aliĝi ĝis fino de Aprilo.

*Kongreso 2028 organizota de Norda Federacio.*
Lille Esperanto kontaktis Lille Kongresa Oficejo por trovi eblajn kongresajn lokoj en la urbo kaj regiono. Ne ricevis respondon, denove kontaktos la oficejon.

*Kongreso 2029* :
Liston de eblaj kongresejoj en la Francilia regiono ricevos RC. Promesite post la kongreso 2026. Denove RC rekontaktos.

3.4 **Kongreso de EsperOri (23-30 oktobro 2026)**
Propono EsperOri de Larysa Osadchuk, Karlo (*Carlos*) Oliveira (el Brazilo) kaj AK, grupo (kun Michela Lipari) de kongresorganizantoj volas ekorganizi kongreson.
Post UK en Lisbono, aperis grupo subtenanta kunigon de Eo kaj origamio
Ekde 2020, ĉiu-dimanĉa renkontiĝo kun partopreno de origamistoj lernantaj pasive Esperanton (kaj esperantistoj).
La kongreso strebos inviti universitatanojn, ĝeneralan publikon, eĉ handikapulojn (KO kutimas labori kun blinduloj). Interna parto: vendrede ĝis dimanĉe. Eblas ankaŭ partopreni pli se disponeblas. Ankaŭ interkulturan programon, ekskursoj, kursoj por komencantoj kaj progresantoj, atelieroj pri origamio, Eo, aliaj temoj. Ĉefa temo: proponi origamion en Eo, terapio, ktp.
Loko (domo de internaciaj rilatoj donas du grandajn salonojn en la centro de la urbo) jam decidita, povos veni ĉirkaŭ 100 homoj.
Bezonas helpon por reklami, financan subtenon por afiŝoj ĉirkaŭ 500€, spertojn de kongresa organizado (skribado franclingve por inviti universitatanoj, oficialuloj).
Jam estas anonco en EventaServo, retpaĝaro, anonco en Eo-aktiv.
Pri financa subteno, unanime por krom unu.
MBM konsideras ke UFE povas subteni mone fakajn eventojn.
DJ konsentas ke UFE kolektu monon se iuj kolektas monon por projektoj.
XG konsideras ke tiu projekto inkluzivas en subteno de kultura agado.
Propono kontakti IREM (*Institut Régional d'Enseignement des Mathématiques*) kiu multe helpis por KN.

> loriot111@gmail.com Larysa Osadchuk / accorigami@gmail.com/carlosinclusao@gmail.com KO (cerbo pri komunikado)
> Kongreso EsperOri en 23-30-an de oktobro 2026 en Montpeliero

3.5 **Kongreso por festi la 140a datreveno de Esperanto**
Pascal D.G. preparas internacian kolokvon okaze de la 140-a datrevenon de la kreado de Esperanto.
Vidu pli en https://cak.ehess.fr/appel/esperanto-140-ans-ceci-nest-plus-un-projet

## 4. KAPABLIGO (kursoj, ekzamenoj.)

4.1 **Ekzamenoj** **INFORMO** 5 min

Pri KER: Niveloj B1, B2, C1 kaj C2 dum UK kaj retaj ekzamenoj okazos dum julio 2026, fizike en Greziljono..

4.2 **Metodo 12** **INFORMO** 5 min

en progreso